**“Internacia Esperanto-Arkivo”**
ASOCIO SEN PROFITDONA CELO

Hasseltsestraat 26
3290 Diest
0761.967.959

KUNORDIGITAJ STATUTOJ

**Fondado :**

- Fondita per privata akto de la 22-a de januaro 2021, publikigita en la Aldonoj al la Belga Ŝtatgazeto en la 27-a de januaro posta sub numero 20210127/0305985.

**Statutŝanĝoj:**

- Statutŝanĝoj per privata akto de la 6-a de aŭgusto 2024, publikigenda en la Aldonoj al la Belga Ŝtatgazeto.

-----

1. La asocio havas la **nomon**: Internacia Esperanto-Arkivo, mallongigite IEspA.
La sidejo troviĝas en la Flandra Regiono.

2. La **minimuma membronombro** estas tri. Minimume la duono de la membroj estas samtempe administranto.
La maksimuma membrokotizo estas po 10 eŭroj jare.

3. La sindonema **celo** de la asocio estas: kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn kaj objektoj en kaj pri Esperanto kaj planitaj lingvoj, maksimume en ilia originala formo (apud diĝitaj kopioj).
Tiu ĉi arkivo celas konservadon kiel heredaĵo, por nelimigita tempodaŭro.

4. Por realigi ĉi tiun sindoneman celon, la asocio **entreprenas** la jenajn agadojn:

a) altirado diversmaniera de arkivaj dokumentoj;

b) provizado de medio (posedaĵo aŭ luado) taŭga por gardado en optimumaj kondiĉoj koncerne klimaton, sekurecon kaj simile. Detala inventaro de la arkivaj dokumentoj estas daŭre ĝisdatigata. Principe ne disponeblas pruntado, la aliro eblas surloke aŭ per aliaj vojoj, ekzemple skano;

c) ĉiuj financaj, industriaj aŭ komercaj operacioj rilate al moveblaĵoj kaj nemoveblaĵoj, kiuj rekte aŭ nerekte rilatas al ĉi-supro aŭ povas kontribui al ilia atingo;

d) transprenado de nemoveblaĵoj kaj transdonado en ajna formo; luprenado kaj ludonado de nemoveblaĵoj, ilia disponigado al uzantoj aŭ disponprenado laŭ fruktuza, hereduza aŭ konstrupermesa interkonsento, aŭ laŭ iu ajn alia interkonsento kiu ofertas similan rezulton; la kreado, prudenta disvolviĝo kaj administrado de nemoveblaj posedaĵoj;

e) prenado kaj donado de pruntoj, kreditoj, financadoj kaj longdaŭra lukontraktado, kadre de la supre menciitaj celoj;

f) akceptado de donacoj.

La asocio ĝenerale havas plenan juran kapablon plenumi ĉiujn agojn kaj transakciojn kiuj (ne)rekte rilatas al la objekto aŭ kiuj estus de tia naturo ke ili (ne)rekte, tute aŭ parte, faciligas la realigon de tiu ĉi objekto.

5. **Membroj** povas **aliĝi** nur kondiĉe de unuanima konsento de la administrantoj. Aliĝo okazas per pagado de la jara membrokotizo.
Eksiĝo de membroj eblas laŭ la kondiĉoj en la leĝo (Art. 9.23) aŭ per nepagado de la membrokotizo.

6. La **Ĝenerala Kunsido** havas la povojn kiujn la leĝo donas al ĝi (Art. 9.12).
Ĝi kunsidas minimume po 1 fojon jare, inter la 1-a de januaro kaj la 31-a de majo. Kunvokado okazas de la administrantaro, laŭ elektronika vojo. La kunsido povas okazi fizike aŭ pere de aŭdvida konferenco aŭ egalvalora maniero.
La decidoj estas notitaj en la raporto kiu estas liverita al ĉiuj membroj. Aliuloj post demando povas enrigardi tion ĉi en la sidejo de la asocio.

7. La **Administrantaro** prefere konsistas el minimume kaj prefere ekzakte tri membroj, kun maksimumo de kvin.
La administrantoj povas akcepti novan administranton kondiĉe de unuanima interkonsento de ĉiuj administrantoj kaj kondiĉe de aprobo de la Ĝenerala Kunsido. Ili estas nomumitaj por nelimigita periodo. Eksigo de administranto eblas per 2/3-a plimulto de la Ĝenerala Kunsido.
Administranto povas rezigni laŭ sia propra peto, la eksiĝo ekvalidas ĉe nomumo de anstataŭa administranto aŭ maksimume ses monatojn post kiam peto pri demisio estis klare sciigita al la aliaj administrantoj.
Kaze de fakta perdo de administranto, pro morto aŭ alia nekapablo, la aliaj administrantoj nomumas anstataŭan administranton.

8. Ĉiu administranto estas individue **rajtigita** kaj povas reprezenti la asocion por ĉiuj agoj servantaj al la celo. Por agoj, kiuj ligas la asocion por grava parto de la valoraĵoj (grando de 5% aŭ pli), estas bezonata decido de du administrantoj kiuj komune agas. Ili al aliuloj ne devas pruvi siajn povojn.

9. Principe la administrantoj por ĉiuj **decidoj** strebas al unuanimeco. Se tiu ne atingeblas, ili voĉdonas per simpla plimulto, krom se ĉi tiuj statutoj aŭ la leĝo postulas malsaman plimulton. Ĉiuj administrantoj havas inter si egalan voĉdonrajton, nur kaze de nedecidaj voĉoj, decidas la voĉo de la administranto kiu estis en oficejo dum la plej longa tempo. Interesokonfliktoj estas regulitaj de la leĝo (Art. 9:8. § 1).

10. **Statutŝanĝoj** estas eblaj kondiĉe de unuanima aprobo de ĉiuj administrantoj kaj laŭ la kondiĉoj postulataj de la leĝo. Ĉi tio nur eblas en la spirito de la nuna celo.

11. La **rimedoj** de la asocio ne povas esti elpagitaj, ili estas uzataj ekskluzive por la celo de la asocio.

12. En kazo de **malfondo**, la tuta posedaĵo, en formo de arkivaj dokumentoj, nemoveblaĵoj, financaj rimedoj aŭ kio ajn, iros al institucio kun similaj celoj, unuavice celanta pluan konservadon dum senlima periodo de la tuta arkivo. Antaŭ tio la fondintoj dum sia vivo jes havas la opcion rericevi sian komencan (ne-financan) kontribuon, aŭ kaze de foriĝo samvaloran ekvivalenton.

POR SAMENHAVA KUNORDIGADO

Verkita en Leuven la 6-an de aŭgusto 2024.